*En la mondon venis nova lingvo*



# Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins

Gotoo Hitosi
José Antonio Vergara
Kimura Goro Christoph
*(Red.)*

Mondial

# En la mondon venis nova lingvo

***Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins***

# En la mondon venis nova lingvo

*Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins*

*Gotoo Hitosi*
*José Antonio Vergara*
*Kimura Goro Christoph*
*(Red.)*

**Mondial**
*2018*

Mondial
Novjorko

# En la mondon venis nova lingvo

*Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins*

Gotoo Hitosi, José Antonio Vergara,
Kimura Goro Christoph
(Red.)

© 2018 La aŭtoroj

Kovrilo: Mondial

Ĉiuj fotoj estas disponigitaj de la aŭtoroj
aŭ de la redaktoroj.

ISBN 9781595693785

www.librejo.com

# Enhavo

Antaŭparolo ........ iii

0. *Gotoo Hitosi:* Enkonduko: Pri D-ro Ulrich Lins, kun speciala atento al lia ligo kun Japanio en fruaj jaroj ........ 1

**Parto I — La suspektinda lingvo**

1. *Renato Corsetti:* Esperanto: lingvo nur principe ĝena por kapitalistoj kaj imperiistoj ........ 17

2. *Nikola Rašić:* Ĉu vere danĝera lingvo? – Ulrich Lins kaj la historio de la futuro ........ 38

3. *Christian Lavarenne:* Ĉu lingvo danĝera por la aliaj ? La enigmo de la ”ŝtelista lingvo” ........ 63

4. *Paul Signoret:* Lingvo danĝera, ĉu ankaŭ por ne- aŭ mal-samideanoj? aŭ : Ĉu daŭre nia standardo restas ”de sangverŝoj pura”? ........ 96

5. *Thomas Bormann:* La danĝeraj lingvo-uzantoj – kiel la sekreta servo de GDR observis esperantistojn ........ 127

6. *Ján Vajs:* Slovakaj esperantistoj kaj ŝtata sekreta polico dum socialismo ........ 146

7. *Vladimir Samodaj:* Esperanto-movado en Soveta Unio en la dua duono de la 20-a jarcento ........ 159

**Parto II — Vivo kaj ago de esperantistoj**

8. *Carlo Minnaja:* Germanoj kaj japanoj en la unuaj tridek jaroj de la lingvaj institucioj ........ 171

9. *Davide Astori:* Giovanni Peterlongo, la Trenta esperantista urbestro ........ 196

10. *Bernhard Tuider:* “Kiel vi vidas, via incito je lerni Esperanton ne estis vana.” Alfred Hermann Fried (1864-1921) kaj lia rilato al Esperanto ........ 220

11. *José Antonio del Barrio:* Serĉe de la valizo de Mangada ........ 242

12. *Ziko van Dijk:* Stettler kaj Jakob – antisemitoj en la koro de UEA ........ 263

13. *Usui Hiroyuki:* Esperanto por Kita Ikki: ĉu unu el la paradoksoj de homo paradoksa? ........ 274

14. *Tanaka Kacuhiko:* La sovetia lingvistiko kaj esperantisto Oosima Yosio ........ 296

15. *Fritz Wollenberg:* La kuraĝulo el Neuruppin. Ludwig Schödl – elstara germana esperantisto kaj pedagogo kun civitana kuraĝo ........ 305

16. *Kimura Goro Christoph:* Isiga Osamu – kristana esperantisto kiu proponis "Orientan Esperanton", tradukis Lagerlöf kaj rifuzis militservi ........ 333

**Parto III — Spuroj el historiaj procezoj**

17. *Bernd Krause:* La "Kvina" de Chautauqua – Kronologio de universala kongreso, kiu neniam okazis ........ 345

18. *Javier Alcalde:* Tri Esperantaj projektoj de Silvio Gesell ........ 372

19. *Geoffrey Greatrex:* Imperiestroj kaj orientaj militkampanjoj ........ 392

20. *So Gilsu:* Azia movado en la komenco (1965~1995) ........ 409

21. *Heidi Goes:* Influo de politikaj cirkonstancoj je la Esperanto-movado en Indonezio ........ 435

22. *Mikaelo Bronŝtejn:* Stratnomoj kun rilato al Esperanto en Kazano (Tatarstano) ........ 466

**Parto IV — Ideoj kaj praktikoj pri Esperanto kaj aliaj interlingvoj**

23. *Guilherme Fians:* La Kosmopolito kaj la Aliulo: Historiaj konsideroj pri diferenco kaj diverseco laŭ la vidpunkto de esperantistoj ........ 475

24. *Leif Nordenstorm:* Leo Tolstoj kaj lia influo al la idearo de Esperanta komunumo ........ 496

25. *Hektor Alos i Font:* Esperantistoj kaj lingva kaj nacia emancipiĝo antaŭ la Dua mondmilito ........ 510

26. *Humphrey Tonkin:* Esperanto kaj monda literaturo ........ 542

27. *Kadoja Hidenori:* Sociolingvistika Lokigo de Esperanto – de lingva rajto al informogarantio ........ 573

28. *Miroslav Malovec:* Pri prestiĝo de lingvoj ........ 580

29. *Jens Stengaard Larsen:* La lingvokritiko de Frederik Dreier ........ 585

30. *Věra Barandovská-Frank:* Conlangs: ĉu studobjekto de interlingvistiko? ........ 617

31. *Gonçalo Neves:* Japanio kaj la latina ........ 633

**Bibliografio de Ulrich Lins** ........ 659

Indekso de personaj nomoj ........ 677

*Javier Alcalde*

# Tri Esperantaj projektoj de Silvio Gesell

**Resumo**
Tiu ĉi teksto esploras la rilaton inter la germana ekonomikisto Silvio Gesell kaj la movado por internacia helplingvo. Temas pri influa pensulo, kun proponoj de socia reformo proksimaj al tiuj de Henry George. Probable li neniam aktivis en la Esperanta movado. Tamen, plurfoje li defendis la utilecon de Esperanto. Tri malsamajn projektojn proponis Gesell, en kiuj ĉi tiu lingvo ludas ŝlosilan rolon. La unua, kiel internacia helplingvo, konceptiĝis komence de la Unua Mondmilito kaj ligiĝas al pacaj celoj. En la dua Esperanto estas lingvo de komunikado de io simila al tio, kio tridek jarojn poste iĝos Eŭropa Ekonomia Komunumo. Trie, Gesell imagis, ke Esperanto fariĝus oficiala lingvo de Supra Silezio, teritorio de Centra Eŭropo pri kiu post la Granda Milito batalis Germanio kaj Pollando. Post prezento de la tri projektoj, ni diskutas la rolon de Esperanto en la pensado de la germana reformisto, sugestante similaĵojn kun la Zamenhofaj ideoj. Krome, personaj rilatoj de Gesell kun konataj esperantistoj konfirmos lian ligon kun la Esperanta movado.

## 1. Enkonduko

Historie, multe da subtenantoj de Esperanto kiel internacia helplingvo montris intereson pri sociaj movadoj kiel pacismo aŭ la laborisma movado. Unu el tiuj ligoj, ankoraŭ ne sufiĉe esplorata, koncernas la esperantistojn, kiuj apogis proponojn por reformi la kapitalisman ekonomian sistemon. Inter tiaj projektoj elstaras tiu de la usona Henry George, bazita sur la ideo ke la tero estu publika posedaĵo de la tuta homaro.[1] Jen influa pensulo kun aventuroplena vivo, kiun ĉi tie ni ne povas detale pritrakti. Sufiĉas diri ke,

1 Henry George fondis ekonomian filozofion, nuntempe konata kiel *georgismo*. Por biografion de Henry George, vidu Barker (1955).

krom esti ĵurnalisto kaj ekonomikisto, li kandidatiĝis al urbestro de Nov-Jorko. En lia elektokampanjo partoprenis socialisto Charles H. Matchett, kiu poste konatiĝos kiel enkondukanto de Esperanto en Usono.[2] Inter la subtenantoj de la Georgaj ideoj troviĝas aliaj esperantistoj, kiel la katalunoj Jesus Paluzie kaj Petro Nuez. La unua estis filo de Josep Paluzie, ankaŭ esperantisto kaj verkisto pri ŝakludo en la frua dudeka jarcento. Laŭ la dua, nelacigebla instruisto de la internacia lingvo, nomiĝas la nuna biblioteko-arĥivo de Kataluna Esperanto-Asocio, en Sabadell.

Ankaŭ subtenis la Georgajn proponojn la germana reformisto Silvio Gesell [1862-1930], fondinto de frata movado: libera ekonomio. Kiel George, la vivo kaj heredaĵoj de Gesell meritus pli da spaco ol tio, kion ni povas al ĝi dediĉi ĉi tie.[3] Ekzemple, lia filo Carlos Idaho fondis en Argentino la nudisman kaj veganan kolonion Villa Gesell.[4] Nuntempe tie loĝas pli ol 30.000 personoj kaj ĝi prosperas kiel turismejo, speciale pro ĝiaj belaj strandoj.

Rilate al ekonomia teorio, Gesell proponis novan valuton, nome *liberan monon* (germane Freigeld), kiu havas jenan proprecon: ĝi perdas valoron laŭmezure, ke la tempo pasas. Tial, rapide ĝi elspeziĝas. Pro la perioda renovigo de la monbiletaj rezervoj, tiu sistemo reduktas interesojn kaj, sekve, la enspezojn de la kapitaloposedantoj. Gesell ankaŭ antaŭvidas naciigadon de la naturaj rimedoj kaj abolicion de la privata terproprieto, tiel eliminante la rentulan klason. Tiamaniere, tiuj kompanioj kiuj uzas liberan monon kontrolos la kvanton de cirkulanta mono kaj ties likideblecon, kaj tiel oni restos protektita kontraŭ mona amasigo.[5]

2 Poste, Matchett partoprenos institucian politikon. En 1892 li estis la unua kandidato de la *Socialist Labor Party of America* [Socialisto Laborista Partio de Ameriko] al vicprezidanto de Usono. En 1896 li kandidatiĝis denove, ĉi-foje al prezidanto de la lando.

3 La interesata leganto trovos pliajn detalojn en Popescu (1965) kaj Onken (1999).

4 Tie ekzistas muzeo dediĉita al la memoro de Silvio Gesell. Vidu Stolleis (2011). Ankaŭ lia vivo kaj laboro elstariĝas en la Historia Muzeo de Eden, urbeto proksima de Berlino, en kiu Gesell mortis kaj estas enterigita.

5 Vidu Gesell (1936).

Gesell, kiel George, influis sur postaj ekonomikistoj, interalie John Maynard Keynes.[6] Aliaj ekzemploj estas la svisaj esperantistoj Georg Heinrich Rotach kaj Paul Enz. La unua prezidis *Svisan Esperanto-Societon* inter 1937-1938. La dua kunfondis *Svisan Ekonomian Rondon* en 1934. Ankaŭ konata kiel WIR-kooperativo, temas pri institucio, kiu efektivigas la ekonomiajn ideojn de Gesell, uzante valuton komplementan al la svisa franko.[7]

Interese, en la artikolo pri Silvio Gesell en iuj Vikipedioj (ekzemple, en la kataluna, angla, hispana aŭ rumana), li menciiĝas kiel esperantisto. Tamen, nenie aperas referencoj konfirmante ĉi tiun aspekton. Eĉ en artikolo pri li en la Esperanta Vikipedio lia esperantisteco ne aperas. Simile, la monumenta laboro de Künzli (2006) nur klarigas, ke iuj de liaj partianoj interesiĝis pri la temo de internacia lingvo.[8] Ankaŭ liaj ĉefaj biografoj ne mencias ĝin.[9] Nur Onken iom rilatas la germanan reformiston al la internacia helplingvo, kiam li asertas, ke ĉirkaŭ 1960 la ĉefa verko de Gesell tradukiĝis en Esperanton, kvankam la manuskripto perdiĝis antaŭ ol ĝi eldoniĝis (Onken 1999: 62).[10] Ĉu eblas, kiel ofte okazas (Sikosek 2003), ke fervoraj esperantistoj troigis la rilaton de la internacia lingvo kun gravulo, kiu neniam lernis la lingvon aŭ eĉ ne esprimis sin pri ĝi?

6 "Mi kredas, ke la estonteco lernos pli de la spirito de Gesell ol de tiu de Marx", opiniis Keynes, kiu dediĉis al li kvin paĝojn de sia *Ĝenerala teorio pri dungado, intereso kaj mono* (1936). Tiurilate, vidu ankaŭ Lounge (2015). Aliflanke, subtenanto de Silvio Gesell estis ankaŭ la verkisto Michael Ende, kiu en 1986 agnoskis en letero al Werner Onken, ke la ekonomiaj teorioj de la socia reformisto inspiris kelkajn partojn de lia *Momo*. Vidu Onken (s/db).

7 En 1998 tiu institucio ŝanĝis ĝian nomon al *WIR Bank Genossenschaft* [Banko WIR Kooperativo], vidu www.wir.ch. Laŭ Torrens (2016), temas pri la plej grava sistemo de socia valuto en la nuno, kiu konsistigas 2% de la svisa BNP (Sánchez-Pagés 2016).

8 Inter ili, Jacob Sprenger (Künzli 2006: 157), kunfondinto de la asocio *Internationaler Befreiungsbund*, kiu sekvis la ideojn de Gesell kaj uzis volapükon kiel laborlingvon; ankaŭ la esperantistoj Walter Giannini (2006: 334) kaj la menciita Heinrich Georg Rotach (2006: 217); kaj la idistoj Alphonse Matejka (2006: 862), kiu estis sekretario de la *Uniono por la Linguo Internaciona* kaj prezidanto de la *Suisa Ido-Societo*; kaj Heinrich Nidecker (2006: 863-864), estonta prezidanto de la *Suisa Ido-Federuro*.

9 Ekzemple, vidu Popescu (1965 kaj 1991) aŭ Blanco (2003).

10 Simile, en alia teksto Onken klarigas, ke kelkaj de la Gesellaj verkoj tradukiĝis al dek lingvoj, inkluzive de Esperanto. Vidu Onken (s/da).

Por solvi la enigmon, ni sisteme analizis la Gesellajn tekstojn. En la kompleta verkaro de Silvio Gesell eldonita de Werner Onken (18 volumoj) ekzistas almenaŭ 15 referencoj al la lingvo iniciatita de Zamenhof. Kiel vidote, temas pri tri malsamaj projektoj en kiuj la aŭtoro imagis fundamentan rolon por la internacia lingvo.

La cetero de la teksto strukturiĝas jene. Unue, ni priskribas la plej ambician Esperanto-projekton de Gesell: la internacia lingvo kiel ŝlosila elemento de la monda paco. Poste, ni analizas duan ideon de la germana ekonomikisto, en kiu Esperanto estas la lingvo de komunikado de internacia institucio sufiĉe simila al tiu, kiu iĝos tridek jarojn poste Eŭropa Ekonomia Komunumo. En tria projekto ĉefrolas Supra Silezio post la Unua Mondmilito. Karakterizita de aparta etno-lingva kunmetaĵo, ĝi bezonas, laŭ Gesell, neŭtralan komunan lingvon. Sekve, ni sugestas similaĵojn inter la Gesellaj proponoj kaj la Zamenhofaj ideoj. Antaŭlaste, ni prezentas kelkajn ligojn de Gesell kun tiutempaj esperantistoj. Fine, mallonga konkludo fermas la artikolon, inkludante rekomendojn por estontaj esploroj.

## 2. Ilo por monda paco

La unua mencio de Esperanto en la Gesella verkaro aperas en broŝuro eldonita en 1914. Temas pri heterodoksa teksto, kiu detaligas kvin taskojn plenumendajn de la venkonto de la Granda Milito. Tiun li imagas kiel pacan diktatoron.[11] Jen la *kvin principoj de fiziokrata paco* "por la amika uzo de la venkonto, sendepende de kiu li estos":

Unue, "tiu, kiu mensogos, estos pendigita", diras Gesell.[12] Ĉar homoj estas nature pacaj, se la amasoj decidas apogi militan konflikton, tio okazas pro la agado de mensoguloj, kiujn oni devas senmaskigi. Por tio, nepras starigi Pacoficejon kun sidejo en Hago

11 Vidu Gesell (1914a).
12 Se oni ne diras alie, ĉiujn tradukojn aperintajn en tiu ĉi teksto faris la aŭtoro.

kaj kun povo por ĉiulande enketi mensogulojn kaj agitantojn, kaj juĝi kaj efektivigi la kondamnojn.[13] Gesell ankaŭ argumentas, ke kaŭzo de milito estas la sekreteco de internacia politiko, plena de mensogoj kaj malveroj, kiu eskapas el publika kontrolo. Sekve, por atingi plej grandan travideblecon, li proponas abolicii la sekretajn traktatojn, kaj forigi la landajn ambasadojn. Laŭ Gesell, "tio, kion devas diri unu registaro al alia povas fariĝi tra la gazetaro." Tial la germana reformisto celas maksimumigi la nombron da homoj interesataj pri internaciaj aferoj. Kiel vidote, tial necesos lingvo de internacia komunikado.

Due, Gesell postulas financajn sinoferojn por konstrui daŭran pacon inter la popoloj. Konkrete, ĉiu persono dediĉu trionon de sia jara enspezo por diversaj porpacaj aktivecoj, inkluzive de la antaŭenigo de Esperanto, ĉar internacia paco bezonas internacian lingvon. "Feliĉe, ni havas Esperanton", diras Gesell. La aŭtoro observas esencan rilaton inter la pacmovado kaj la internacia helplingvo. Fakte, la Haga Pacoficejo respondecus pri la disvastiĝo de Esperanto per ĉiuj necesaj rimedoj. Tiucele ĝi havus dek miliardojn da markoj, kiujn transdonos dum la venontaj dek jaroj la perdontoj de la Unua Mondmilito kiel militdamaĝokompenson. Al tiu sumo aldoniĝus egala kvanto, kiun alportus la paca diktatoro de siaj propraj rimedoj, kaj ankaŭ la kontribuo de neŭtralaj landoj, kiuj dediĉus al tio 50% de siaj militaj buĝetoj. Tiel kovriĝus la lingvolerna kosto de Esperanto. Post trejnado en Hago, Esperantaj instruistoj estus senditaj ĉiulanden kiel pacapostoloj.[14] Gesell ankaŭ antaŭvidas servon de redaktado de literaturaj verkoj en Esperanto, cele al pacostimulo. Inter ili, elstaras sciencaj verkoj,

13 Rilate al tiu Pacoficejo, eblas starigi plurajn hipotezojn. Unuflanke, ekzistis jam en 1914 *Bureau International de la Paix*, kiu havis grandan prestiĝon inter pacistoj - ekzemple, ĝi gajnis la Nobel pacpremion en 1910 (tiu jaro ankaŭ kandidatiĝis Ludwig Zamenhof) - sed ĝia sideĝo estis en Berno (Svislando). Aliflanke, en Hago ekzistis *Konstanta Arbitracia Kortumo*, kiu respondecis pri efektivigo de iuj funkcioj, kiuj Gesell antaŭvidas por sia *Friedensbureau*. Tamen, konsiderante la ambicion de la Gesella projekto, eblas imagi trian eblon, nome, institucio ankoraŭ ne kreita, kiu fondiĝus post la milito, eble simila al tiu, kiu poste iĝos la Ligo de Nacioj.

14 Tiusence, la germana reformisto mencias iun Akademion de Esperanto kun sidejo en Hago. Vidu Gesell (1914a).

kiuj estus esperantigitaj por internacia distribuo je reduktita kosto. Fine, la Haga Pacoficejo publikigus gazeton en Esperanto je malmultekosta prezo.

Gesell argumentas, ke milito rezultas de homoj kiuj, ne havante rimedojn por komuniki en siaj internaciaj rilatoj, agas kiel surd-mutuloj. Tio suspektigas ilin pri siaj najbaroj kaj tial ili armas sin, nutrante malfidon je la alia partio en malvirta ĉeno, kiu ofte finiĝas en perforta konflikto. Tiurilate, internacia paco kompareblas multdimensie al la Babelturo, ĉar laŭ la germana reformisto "ambaŭ ne povis realiĝi pro la konfuzo de lingvoj."

Anticipe al kritiko, Gesell asertas, ke Esperanto ne celas anstataŭigi naciajn lingvojn, sed doni la ŝancon interkompreniĝi al tiuj, kiuj vojaĝas preter la limoj de sia lando. Anstataŭ lerni multajn lingvojn kaj paroli ilin nur je baza nivelo, la germana reformisto proponas lerni ununuran fremdan lingvon, sed regi ĝin perfekte. Resume, el tiu perspektivo la uzo de internacia lingvo elmontrigus kaj sendanĝerigus mensogulojn kaj agitantojn.[15]

Trie, oni eduku la popolon pri mona politiko, tiel ke oni kapablu elteni la mensogojn de la defendantoj de orbazo. Gesell diras, ke orbazo bataligas la homojn unu kontraŭ la alian, dum "homoj ne vidas la ŝnuron per kiu ili sufokiĝas". Tiusence, la mensogulo kaj la sensciulo "kuniras kiel kato kaj muso". La mensogulo danĝeras, ĉar ĝi ekspluatas la sensciulon. Gesell pritraktas ĉi tiun temon per la okazo de Anglio. Laŭ la germana pensulo, la brita registaro sukcesis altrudi la ideon de milito ĉar la amasoj ne estis sufiĉe edukitaj, kaj specife, al ili mankis scio pri monpolitiko. Tial oni devas provizi la necesajn rimedojn por atingi altan nivelon de edukado en la loĝantaro. Tiun mision, nome lumigi la scion de la amasoj pri forgesitaj areoj de la mona sistemo kaj ekonomiaj rilatoj, pritraktu la Pacoficejo, kiu ankaŭ kapablu agi kontraŭ la defendantoj de orbazo. Kiel respondeculoj de

15 Gesell ilustras tiun ĉi ideon pere de la jena ekzemplo: "Se Aristotelo verkintus Esperante sian naturan historion de la hejma muŝo, ne necesus 2000 jaroj por malkovri, ke muŝo ne havas ok krurojn, sed ses. Kaj la samo okazas koncerne al ĉiu ajn afero. Cent milionoj da okulparoj kontrolas tion verkitan en la germana, dum du mil milionoj kaŝe rigardas la fingron eksribantan Esperante". Vidu Gesell (1914a).

skandalaj fraŭdoj, ili kontribuis al la eko de la milito kaj tial ili meritas ekzemplodonan punon.

Kvare, Gesell proponas aboli doganajn landlimojn. "Ne eblas daŭra paco inter la nacioj, dum ili konstruas artefaritajn eksterajn murojn ĉirkaŭ si." Al tio oni devas dediĉi rimedojn, sed ankaŭ sinoferi naciajn idealojn kaj antaŭjuĝojn pri la supozitaj avantaĝoj de protektismaj politikoj, kiuj nur utilas al privataj rentoj kaj al monopoloj. Tiel, la forlaso de orbazo venigos liberan komercon, tio estas, tutmondan doganan union. Dum tarifoj apartigas homojn inter si, tiuj landoj, kiuj decidos kunlabori en dogana unio havos neniun instigon al milito.

Forigante ŝtatajn limojn, la bezono por pligrandigi la landon perdas sian signifon kaj sian barbaran esprimon: militon. Kune kun aliaj faktoroj, kiel boatoj, kosmopolita juro kaj Esperanto, Gesell proponas tiel venki naturajn, klimatajn, lingvan kaj rasan barojn.

La germana reformisto petas proklami kosmopolitan leĝon, kiu permesos ĉiun homon diri: "Mia regno estas la mondo (...) Nur necesas doni al ĉiu homo la saman rajton, kiun oni donas al la birdoj kaj al la vento." Ĉi tie Gesell denove mencias Esperanton kiel ilon por superi lingvajn barojn, kiuj malfaciligas la liberan movadon de la homoj translandlime. Simile, sen landlimoj solviĝos politikaj konfliktoj kiel la pola, la albana aŭ la alzaca. Koncerne al rasaj aferoj, Gesell kredas, ke la ŝtato ne devas interveni, ĉar temas pri la privata sfero de la homoj.

Kvine, temas pri la rilato inter internacia politiko kaj internaj aferoj de la ŝtatoj; alivorte, internacia paco kaj socia paco. Tiurilate, la aŭtoro demandas sin "kiel oni povas paroli pri paco inter la nacioj, dum ni estas ĉirkaŭitaj en nia propra lando de mastroj kaj sklavoj?" La germana reformisto tiel aludas al "ne gajnitaj enspezoj", tio estas, la interesoj de bazaj rentoj kaj kunmetita kapitalo, kiuj leviĝas el privata proprieto kaj orbazo. Mallonge, "oni ne havos nek internacian pacon nek socian pacon dum oni ne nuligos tiujn du paganajn instituciojn." Devas ĉesi tial la homan dividon inter laboristoj kaj pensiuloj, por ke ĉiu homo laboru kaj ĉiu havu ankaŭ sian parton de vivĝuado. Ververe, finas Gesell, milito estas nenio pli ol lukto inter la gajnantoj kaj la perdantoj de la ne gajnitaj enspezoj.

## 3. Esperanto kiel lingvo de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo

En 1916 Gesell proponas la kreon de "tutmonda centra VIER". Temas pri ekonomia unio de eŭropaj landoj, kiuj kune fariĝus kvara monda potenco, flanke de Usono, Britio kaj Rusio.[16] Laŭ tiu ĉi projekto, ĉiu lando enirus la union kaj elirus ĝin libervole. Ĝiaj membroj tenus sian suverenecon kaj fokusiĝus pri stabiligado de siaj valutoj kaj tiamaniere, ties kurzo. Krome, en la kadro de civitanaj rajtoj, ili sin devigus protekti naturajn rimedojn de misuzo fare de la ŝtato aŭ de privataj institucioj. Fine, ili rezignus pri doganaj tarifoj por konstrui liberan komercon.

Kosmopolita, sed pragmata, Gesell kredas, ke la membrolandoj devas unuiĝi nur pro sia intereso en la avantaĝoj de ekonomia unio. Tio estas, ekzistu neniu ligo de kultura, historia aŭ rasa idento inter ili. Fakte, VIER enhavu iun ajn landon, "kiu tion deziras, ankaŭ tiuj ekzotikaj, nigraj aŭ flavaj." Sekve, la lingva reĝimo, kiun Gesell imagas por tiu ĉi kvara potenco estas "artefarita lingvo libera de rasaj, etnaj, historiaj aŭ geografiaj antaujuĝoj, kiel Esperanto".

En 1924, kiam detalante la statutojn de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo, li ripetas parton el tiaj ideoj.[17] Tiel, kune kun komuna ekonomia politiko - nome, libera komerco-, enestas aliaj komunaj politikoj en diversaj kampoj, kiel la metra sistemo, Esperanto (Ido) kiel oficiala lingvo kaj komuna poŝta sistemo. Kiel videblas, rilate al la lingvo de komunikado, reaperas la vorto 'Esperanto', sed ĉi-foje interkrampe aldoniĝas la vorto 'Ido'. Eblas interpreti ke, konsciante pri la skismo en la movado por internacia helplingvo inter tiuj, kiuj defendas Esperanton kaj tiuj, kiuj preferas Idon, Gesell decidas ne preni flankojn kaj simple vetas pri iu ajn alternativo, probable tiu, kiu gajnos la lingvan batalon.[18]

16 Vidu Gesell (2016a).
17 Vidu Gesell (1924).
18 Por detala studo de la konkurado inter la subtenantoj de diversaj artefaritaj lingvoj por iĝi la internacia helplingvo, vidu Garvía (2015).

En la lasta alineo de tiu ĉi teksto Gesell denove priparolas la lingvan aferon. Menciinte la enorman povon, kiu kuŝas en komuna ekonomia sistemo (libera komerco), komuna valuto, kaj komuna jura sistemo, li denove emfazas la signifon de komuna lingvo, libera de etnaj, historiaj, geografiaj kaj rasaj akcentoj. Alivorte, Gesell konkludas: "artefarita lingvo".

En 1927 Gesell revenas al tiu temo en studo komparanta usonan konkurenceblon kaj tiun de la eŭropaj landoj.[19] Inter la avantaĝoj de la usonanoj, Gesell aludas al vasta teritorio, tio estas, granda ekonomia areo, en kiu ekzistas libereco de movado por ĝiaj loĝantoj. Konsiderante adopti similan sistemon por la Eŭropa kontinento, la aŭtoro asertas, ke tia libereco de movado en la eŭropa ekonomia spaco nepre kondukus al la bezono interkompreniĝi, kaj sekve al la uzo de "universala lingvo." La kunekzisto de tiuj faktoroj ebligus la kreon de *homo europaeus* simile al maniero, kiel la konglomeraĵo de eŭropaj enmigrintoj kreis la usonan civitanon. Gesell, tamen, estas longa-tempa pesimismulo. Kvankam li opinias, ke tiu ekonomia ento kreita de libera komerco faciligus la psikologiajn kondiĉojn por ĝenerala malarmado kaj internacia paco, laŭ Gesell tiuj nacioj nepre provokos novan militon, ĉar ili aliĝis al kapitalismo. Profunde individuisma, la germana reformisto klopodos proponi teorion por superi ambaŭ marksismon kaj kapitalismon.[20]

## 4. Oficiala lingvo de Supra Silezio

Post la Unua Mondmilito, multaj teritorioj ŝanĝis siajn landlimojn kaj kelkaj restos sen klara referenclando. Inter ili, elstaris Supra Silezio. Integra parto de la Germana Imperio ekde 1871, ĝi estis postulita de Pollando pro ĝiaj signifaj minejoj, kiuj respondecis pri 25% de la tuta karbo, 81% de la tuta zinko kaj 34% de la tuta plumbo produktita en Germanio (MacMillan, 2001: 229). Sen ili,

19 Vidu Gesell (1927).
20 Vidu Gesell (2014b).

argumentis la germana registaro en la intertraktadoj de Parizo de 1919, ili ne kapablos pagi militdamaĝokompensojn (MacMillan, 2001: 230). Koncerne ĝian etno-lingvan distribuon, en 1910 53% de la loĝantaro parolis la polan kaj 40% la germanan (Weber 1913: 27); aldone, ekzistis ankaŭ minoritato de parolantoj de la ĉeĥa. Sub la germana Imperio, tiuj lastaj sentis sin diskriminaciitaj kaj traktataj kiel duarangaj civitanoj (Hund et al, 2011: 20-21.).

Laŭ tio, kion disponis la Traktato de Versajlo, en marto 1921 okazis referendumo, en kiu 59.4% de la regionaj loĝantoj voĉdonis por aparteno al Germanio, dum 40.6% voĉdonis por Pollando. Alivorte, parto de la loĝantaro de pola origino voĉdonis por Germanio, montrante ke ekzistis ankaŭ pragmataj konsideroj krome al tiuj etnaj. Fine, komitato de la Ligo de Nacioj konsistigita de kvar landoj sen interesoj en la regiono (Belgio, Ĉinio, Hispanio kaj Brazilo) decidis dividi la teritorion inter la du landoj. Tiel, Germanio obtenis parton pli grandan, sed ekonomie malpli gravan, kaj kun simila kvanto da homoj ol tiu parto obtenita de Pollando (MacMillan 2001: 231). Post multaj monatoj, la du landoj interkonsentis kunlaboran traktaton, kiu enhavis altan gradon de aŭtonomeco por la du novaj provincoj, kaj provizoj pri respekto por siaj respektivaj minoritatoj, kiujn tamen ili ne plenumos.[21]

La propono de Silvio Gesell (1921) estis fundamente malsama. Li sugestis plenan aŭtonomecon por la loĝantoj de la regiono, kun la sekvaj kondiĉoj: (a) libera komerco kun ĉiuj najbaraj landoj; (b) ŝtata malmuntado en ĉiuj kulturaj aferoj, inkluzive de la privatigo de la Eklezio kaj de la lernejoj, kaj ankaŭ gazetara libereco; (c) malfondo de ĉiu milita povo; (d) cirkulado de *libera mono* kaj internaciigo de karbominejoj en la senco de *libera tero*; kaj (e) Esperanto kiel oficiala lingvo.

Temis do pri paca propono bazita sur la rekono de la rajto je memdetermino, malarmado de la socio, libera komerco, liaj ekonomiaj ideoj pri libera mono kaj libera tero (Gesell 1936),

21 Konkrete, la germana minoritato en teritorio de pola mastrumado estos diskriminaciita. Kiam en 1945 Pollando rekuperos la regionon, ĝi elpelos la plej grandan parton de siaj germandevenaj loĝantoj (MacMillan 2001: 231).

kaj internacia helplingvo kiel neŭtrala lingvo per kiu diskuti komunajn regionajn aferojn. Ĉi tiu pacisma sinteno probable rilatis al la fakto, ke la referenduma kampanjo estis influita de armitaj volontuloj venintaj el la tuta Germanio.

Gesell reeldonos sian proponon pri Supra Silezio en 1922, ĉi-foje iom modifita. En la nova versio, la lingva reĝimo de la aŭtonoma Supra Silezio vortumas jene: "Esperanto aŭ almenaŭ plena egaleco de la du lingvoj kiel oficialaj lingvoj".[22] Tiu ŝanĝo rilatigas la lingvon de Zamenhof kun la oficiala statuso de la du ĉefaj lingvoj en la teritorio, tiel klarigante la inkludon de la lingva kondiĉo en lia unua propono. Alivorte, laŭ Gesell, Esperanto kiel oficiala lingvo solvas lingvajn konfliktojn kiel tiu, kiu ekzistis en Supra Silezio. Ne temas pri bagatela afero, sed ligiĝas al la paca postvivado de la regiono, kiu, kune kun socia paco en Germanio, iĝus semoj de paco inter la popoloj. Tial Gesell inkluzivas la lingvan dimension en sian pacan proponon, samnivele kiel libera komerco aŭ malarmado.

La germana reformisto finas notante, ke milito ŝprucas de la neceso vastigi nacian ekonomian areon, kiu laŭdifine neniam sufiĉos, tial inkludante eventualan internacian streĉiĝon. Ilustrita per la okazo de Supra Silezio, la solvo klaras: "La signifo de la ŝtato kaj de la nacio devas reduktiĝi al nulo." Kiel vidite, Gesell ankaŭ sugestas disiĝi edukadon kaj religion disde la ŝtato, kune kun la senaktivigado de la milita povo pere de la malfondo de la armeo, kaj la nuligo de privataj ekonomiaj interesoj pere de libera komerco. En tiu ĉi kunteksto staras lia propono por superi lingvajn konfliktojn.

22 Vidu Gesell (1922).

## 5. La Gesellaj projektoj, ne tiom for de la Zamenhofaj ideoj

Post la studo de la diversaj Gesellaj projektoj, eblas aserti ke lia rilato al Esperanto okazas el pacisma aliro, kiu memorigas al ni la Zamenhofajn ideojn. Ne nur en lia unua propono la internacia lingvo ligiĝas al pacserĉado, sed ĉiuj el ili ververe aspiras al la sama celo. Fakte, tiu ĉi perspektivo estas esenca parto de lia ekonomia pensado, kiu lastinstance proponas interhomajn kaj interlandajn rilatojn pli homecajn, destinatajn al konstruado de pli paca mondo. Tiusence, eblas kompreni la Gesellan teorion kiel parton de la pacisma esperantismo de la epoko.[23]

Kiam li klarigas la unuan projekton, la germana reformisto uzas konatan argumenton de la Esperanta movado. Antaŭirante kritikojn, li substrekas, ke kiel helplingvo, Esperanto ne celas anstataŭi la ceterajn lingvojn. Verkita dum la Unua Mondmilito, lia analizo rilatas la malfacilaĵojn de internacia komunikado kun la eko de armitaj konfliktoj, simile al la utopia idealismo de Zamenhof. Tiusence, la Babeltura mito ilustras precize la sekvojn de lingvaj konfliktoj.

Por Zamenhof lingvo estas flanka afero kompare al lia etika propono.[24] Simile, en la Gesella pensado, ĝi malpli gravas ol ekonomiaj reformoj. En alia de siaj pacaj publikaĵoj, la germana reformisto argumentas, ke por eviti militojn ne sufiĉas pritrakti lingvajn kaj religiajn aferojn, sed necesas solvi profundajn ekonomiajn temojn. Interalie, temas pri privata proprieto, orbazo, doganaj tarifoj kaj tiuj interesoj, kiuj riĉigas la rentulan klason.[25]

Per sia dua propono, Gesell montras sin avangardulo. Kurioze, ankaŭ Zamenhof sugestis en sia *Alvoko al la diplomatoj* en 1915 la

23 Por esploro pri la malsamaj tipoj de pacismo dum la Unua Mondmilito, vidu Alcalde (2018).

24 Jam en 1929 Johannes Dietterle asertis: "la tre ideala homaranisma ideo okupis lin dum lia tuta vivo, kaj kiel ŝajnas al mi por li estis ankoraŭ pli grava, ol la tuta ideo de internacia lingvo, kiu evidente servis al li nur kiel vojo al la ideala celo, kiun li esprimis per la preskaŭ sinonimaj vortoj *hilelismo* kaj *homaranismo*". Vidu Zamenhof (1929: 313-343) kaj ankaŭ Schor (2016).

25 Vidu Gesell (1917).

kreon de ento simila al tiu, kiu poste iĝos Eŭropa Unio.[26] Nepras konsideri, ke la Tuteŭropa Unio ne eldonos sian unuan manifeston, *Paneuropa*, ĝis 1923. Nuntempe, elementoj kiel la metra sistemo aŭ komuna poŝta servo estas esencaj partoj de internaciaj rilatoj. Kiel bone antaŭvidis Gesell, la Unuiĝinta Reĝlando ne kundividas la eŭropan aliancon samnivele kiel la landoj de la kontinenta Eŭropo.[27] Ĉar oni elektis malsaman solvon ol tiu proponitan de Gesell, la lingva afero en Eŭropa Unio daŭre okazigas intensan debaton pri diversaj aferoj koncerne justecon kaj efikecon.[28]

Trie, la pravigo de la propono por Supra Silezio similas al la ideoj de Zamenhof kiam li prezentis sian homaranisman proponon en 1913.[29] Unuflanke, en landoj kun interetnaj konfliktoj, neŭtrala lingvo faciligus la partoprenon de lingvaj minoritatoj, sekurigante inkluzivan kaj pli egalecan reprezentadon, kaj ankaŭ pli justan distribuon de la varoj. Krome, tiu ĉi lingvo utilus kiel publika sfero, en kiu debati aferojn de komuna intereso. El tiu perspektivo, eblas imagi, ke Zamenhof subtenus la lingvan reĝimon proponitan de Gesell por Supra Silezio. Tiamaniere interpreteblas evoluo de la Gesella pensado pri internacia lingvo. Fakte, en la revizio de sia propono por Supra Silezio, li ŝajnas rekoni malfacilecon efektivigi la Esperantan opcion, kaj eble pro tio li sugestas alternativon bazitan sur oficialigo kaj de la germana, kaj de la pola. Tamen, de la konkreta vortumado diveniĝas, ke temas pri esplorebla opcio nur se ne akceptiĝas lia prefera plano; tio estas, Esperanto kiel oficiala lingvo. Kiel vidite, Gesell (same kiel Zamenhof) elvolvas sian projekton por solvi lingvajn konfliktojn motivigite de forta konvinko, nome: nepras superi naciismajn logikojn.

26 Vidu Zamenhof (2006).

27 Ni ne parolas nur pri la Briteliro, sed pri la fakto, ke kelkaj aferoj menciitaj de Gesell, kiel la metra sistemo, aparte aplikiĝas en la Unuiĝinta Reĝlando.

28 Ekzemple, vidu Fiedler (2010) aŭ Gazzola (2016).

29 Vidu Zamenhof (2006). Fakte Zamenhof jam enhavis tiun ideon en la antaŭparolo de la Unua Libro, kiam li klarigas, ke sia propono "povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa".

## 6. La rilato de Gesell kun tiutempaj esperantistoj

Spite tion, kion ni diris ĝis nun, probable Gesell neniam aktivis en Esperantaj asocioj. Ekzemple, lia nomo ne aperas inter la aliĝintoj en la tiutempaj Universalaj Kongresoj. Tamen, Esperanto ja ludas ŝlosilan rolon en kelkaj el liaj proponoj. Krome, la germana reformisto havis kontaktojn kun diversaj esperantistoj.

En aprilo 1919, Silvio Gesell fariĝis ekonomia ministro en la efemera revolucia registaro de la Bavara Konsilantara Respubliko, kiu daŭris nur semajnon. Lia sekretario estis Theophil Christen, kiun li konis almenaŭ de 1901.[30] Christen, pioniro en la esploro de fizikaj aplikoj en medicino, ankaŭ verkis pri agrara reformo kaj pri mona reformo, kaj multe aktivis en la Esperanta movado. Li estis prezidanto de la svisa asocio de esperantistaj kuracistoj, membro de la organiza komitato de la UK en Berno 1913 kaj ankaŭ de la Akcepta Komitato de tiu kongreso.[31]

Aliflanke, la kompleta verkaro de Gesell eldonita de Werner Onken enhavas leterojn, kiuj eksplicite mencias Esperanton. En tiu al Fritz Schwarz, 21 Junio 1918 de Haut Les Geneveys, Gesell klarigas la evoluon de malsamaj grupoj, kiuj efektivigas siajn ideojn pri libera mono. Specife, ĝi mencias la liberajn asociojn de 'Avangardo' - Munkeno, Nurenbergo kaj Eden -, kaj ankaŭ la Esperantan klubon de tiu ĉi lasta malgranda urbeto proksima al Berlino, kie la germana reformisto pasigis siajn lastajn tagojn. Temas pri kooperativo, kiu enhavas Esperantan asocion. [32] Tamen, ni ne konas la konkretan rilaton de Gesell kun ĉi tiu klubo. Ĉu li membris tie? Ĉu ĝi kreiĝis pere de lia propra iniciato? Ĉu lia intereso pri la internacia lingvo venis ĝuste de kontaktoj kun tiu klubo? Iel ajn, ĉi tiu letero montras fluan rilaton de Gesell kun lokaj esperantistoj. Krome, kelkaj el liaj verkoj jam tradukiĝis en Esperanton.[33]

30 Vidu Muster (2010).

31 Vidu Künzli (2013).

32 Por koni la historion de tiu komunumo, vidu Eden Gemeinnützigkeit Obstbau-Siedlung eG (s/d).

33 Tiusence, vidu Gesell (1913, 1914b kaj c.1919). La eldono de Gesell (c. 1919) okazis nur kelkaj jaroj post la publikigo de la originala dokumento (Gesell 1916b). Temis pri pa-

Dua interesa letero de la kolekto Onken estis skribita al Gottlieb Kolb (2 Aprilo 1924) de Rehbrücke. En ĝi, Gesell petas al Kolb, ke estu li persone, kiu korespondu kun rusa subtena grupo. Li ankaŭ komentas, ke la plej taŭga lando por efektivigi reformojn estas ĝuste Rusio. Krome, la germana pensulo aneksas "militan pamfleton de 1915, en kiu mi [li] dediĉas grandan emfazon al la Esperanta lingvo", kaj petas al Kolb, ke li plusendu ĝin al iu S-ro Szabuniewic.[34] Fakte, Kolb estis konata aktivulo de la Esperanto-movado kaj Onken kredas necese klarigi tion al la leganto: "Gottlieb Kolb estis oficisto de la revuo en Esperanto *Nova Ekonomia Politiko*".

## 7. Konklude

En tiu ĉi teksto ni analizis tri esperantajn projektojn de Silvio Gesell, ankaŭ montrante, ke li havis proksiman rilaton kun tiutempaj subtenantoj de la internacia lingvo. Aldone, el esence pacisma sinteno ni identigis kelkajn similaĵojn inter la ideoj de Gesell kaj tiuj de Zamenhof, kiuj koincidas en la tempo. Eblas noti, ke Gesell verkas pri la internacia lingvo en sia matura epoko. Li jam loĝis en malsamaj landoj kaj havis malbanalajn travivaĵojn, kiel tiu de ekonomia ministro de revolucia registaro en Bavarujo. Tiusence, eblas kompreni liajn lingvajn proponojn kiel frukton de daŭra pripensado, kaj verŝajne kiel sekvon de esperantaj kontaktoj kiel tiuj menciitaj.

cisma teksto, kiun postaj reeldonoj de sia klasika verko en la franca kaj en la germana enhavos kiel postparolon, kune kun alia simila teksto (vidu Gesell 1917). Koncerne pli lastatempajn publikigaĵojn, la lasta Gesella verko eldonita en Esperanto estas sia utopio de la insulo Baratario, kiu li verkis en klara referenco al Cervantes (vidu Gesell 1983; Stolleis 2011). Aliflanke, ekzistas ankaŭ verkoj tradukitaj en Idon, sed laŭ nia kono, ĉiuj estas pli malfruaj (ekzemple, Gesell 1985). En pli freŝa epoko aperis ankaŭ enkonduko en Ido al la Gesella pensado. Vidu Onken (1998).

34 Verŝajne Gesell aludas ĉi tie al dokumento eldonita en 1914, kiu ni jam analizis en la dua parto de tiu ĉi teksto. Vidu Gesell (1914a).

Plia esplorado devus profundigi la ligojn inter la germana reformisto kaj la movado por internacia lingvo[35], konsultante interalie la dokumentaron haveblan ĉe la Muzeo de Villa Gesell kaj en la germana urbo Eden. Ĉi tiu unua alproksimiĝo al la afero sugestas, ke ekzistas ankoraŭ multo por malkovri en la ligoj inter la Zamenhofa lingvo kaj kelkaj el la ĉefaj internaciaj debatoj de tiu ĉi historia periodo.[36]

**Dankoj**

Werken Onken gvidis min en sia kompleta verkaro de Silvio Gesell kaj ĝentile respondis kelkajn demandojn. Jochen Kleres helpis miajn dubojn pri la tradukoj de la originalaj Gesellaj tekstoj. Bernhard Tuider havigis al mi *La solvo de la sociala mondproblemo transe de kapitalismo kaj komunismo*, de la Kolekto por Planlingvoj de la Nacia Biblioteko de Aŭstrio. Ramon Perera pruntedonis al mi aliajn referencverkojn. Hèctor Alòs legis antaŭan version de la ĉapitro kaj liaj komentoj utilis por plibonigi ĝin. Al ĉiuj mi dankas sincere. Kompreneble, pri iu ajn eraro respondecas nur la aŭtoro.

## Bibliografio

Alcalde, Javier (2018): "Pacaj klopodoj. La praktika internaciismo de Esperanto". En Javier Alcalde; José María Salguero (red.), *Antaŭ Jarcento. La Granda Milito kaj Esperanto*. Parizo: SAT.

Barker, Charles Albro (1955): *Henry George*. Oxford: Oxford University Press.

Blanco, Alfredo Félix (2003): "Silvio Gesell. Empresario, reformador social y economista". *Suplemento Debates*. *La Mañana de Córdoba*, 27 Marto 2005. http://www.eumed.net/ce/2005/afb-gesell.htm

35 Tiurilate, aperas ankaŭ mencio de Volapük en pli frua verko de Gesell (1902), kie li proponas "instruadon de universala lingvo de komunikado (Volapük), por ke la komercisto liberiĝu de la problemoj de lernado de dekoj da fremdaj lingvoj".

36 Por rigora kaj detala analizo de la graveco de Esperanto en la tiutempaj debatoj, vidu Garvía (2015).

Eden Gemeinnützigkeit Obstbau-Siedlung eG (s/d). *Chronik*. http://www.eden-eg.de/seite/121404/chronik.html

Fiedler, Sabine (2010): "Approaches to fair linguistic communication". *European Journal of Language Policy*, n-ro 2:1, p. 1–22 .

Garvía, Roberto (2015): *Esperanto and its Rivals*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.

Gazzola, Michele (2016): "Multilingual communication for whom? Language policy and fairness in the European Union". *European Union Politics*, n-ro 17:4, p. 546–569.

Gesell, Silvio (1902): "Eine neue Orientierung auf dem Gebiete der sozialen Frage". *Die Geldreform*, n-ro 6/1902.

— (1913): *La Reforma Mono*. Trad. Paulo Staniŝiĉ. Amsterdam: Nutters.

— (1914a): "Physiokratische Friedensdiktate zum freundlichen Gebrauch für den Sieger, wer immer er auch sei". *Kriegsflugblatt*, n-ro 6/1914.

— (1914b): *La solvo de la sociala mondproblemo transe de kapitalismo kaj komunismo*. Hamburgo: Freisoziale Union.

— (1916a): "Die Weltkraftzentrale „VIER" und ihre Verfassung". *Der Physiokrat*, n-ro 7/1916 .

— (1916b): *Gold oder Frieden?* Prelego en Berno, 28 aprilo 1916.

— (1917): *Le sol franc, condition essentielle de la paix*. Prelego en Zurigo, 5 julio 1917.

— (ca. 1919): *Oro kaj Paco?. Ĉu la civitana kaj internacia pacoj estas akordeblaj kun la ora valuto?* Frankenthal-Pfalz: A. Meissner.

— (1921): *An das deutsche Volk! – Kundgebung auf demKongreß zu Hannover*. Erfurt: Freiland-Freigeld-Verlag,

— (1922): *Die Diktatur in Not. Sammelruf für die Staatsmänner Deutschlands*. Erfurt: Freiland-Freigeld-Verlag.

— (1924): Statuten der Vereinigten Staaten von Europa. *Die Freiwirtschaft durch Freiland und Freigeld*, n-ro 7/1924.

— (1927): Erklärungsversuche für den amerikanischen Acht-Dollar Lohn. *Die Freiwirtschaft durch Freiland und Freigeld*, n-ro 1/1927.

— (1936) [1916]: *El Orden Económico Natural por libremoneda y libretierra*. Sepa eldono. Buenos Aires: E. F. Gesell. http://silvio-gesell.de/el-orden-economico-natural.html

— (1983): *La Mirakla Insulo baratario*. Trad. Petro Rulofido. Soest: Eldonajo de Universale Ligo.

— (1985): *La marveloza insulo Barataria*. Berlin: Gemana Ido Societo. Trad. Klaus Rosenfeld. Reeldonita en 1990 kaj 1993.

— (2000): *Gesammelte Werke. 18 Bände und Registerband*. Kiel: Gauke Verlag für Sozialökonomie. https://archive.org/details/gesell_gesammelte_werke

Hund, Wulf D.; Christian Koller, K., Moshe Zimmermann (2011): *Racisms Made in Germany*. Münster: LIT.

Keynes, John Maynard (1936): *The General Theory of Employment, Interest and Money*. London: Macmillan.

Künzli, Andreas (2006). *Universalaj Lingvoj en Svislando*. La Chaux-de-Fonds: CDELI.

— (2013): *La 9a Universala Kongreso de Esperanto en Berno*. http://www.planlingvoj.ch/9aUK_Berno1913_Dokumentaro.pdf

Louge, Carlos Fernando (2015): *Keynes & Gesell - ¿Nuevo paradigma?*. Buenos Aires: Errepar.

MacMillan, Margaret (2001): *Peacemakers. Six Months that Changed The World: The Paris Peace Conference of 1919 and Its Attempt to End War*. London: John Murray.

Muster, Eduard (2010): *Dr. Theophil Christen*. http://www.edi-muster.ch/politik/theophil-christen.htm

Onken, Werner (1998): *Kurta introdukto aden la teorio di Silvio Gesell pri libera sulo e libera pekunio.* Trad. Alfred Neussner. Frankfurt am Main: Initiative für Natürliche Wirtschaftsordnung.

— (1999): *Silvio Gesell und die Natürliche Wirtschaftsordnung. Eine Einführung in Leben und Werk*. Lütjenburg: Gauke.

— (2002): “Teología y economía de la liberación. América Latina: 500 años de muerte, despojo y explotación”. *Zeitschrift für Sozialökonomie*, n-ro 94. http://userpage.fu-berlin.de/~roehrigw/spanisch/onkenspa.htm

— (s/da) *Economía de mercado sin capitalismo*. http://userpage.fu-berlin.de/~roehrigw/spanisch/spa4.htm

— (s/db) *Die ökonomische Botschaft von Michael Endes „Momo“.* http://www.sozialoekonomie.info/Weiterfuhrende_Informationen/Momo_UnendlicheGeschichte/momo_unendlichegeschichte.HTM

Popescu, Oreste (1965): *Ensayos de doctrinas económicas argentinas*. Buenos Aires: Ediciones Depalma.

— (1991): *Silvio Gesell: centenario de su primera publicación*. http://userpage.fu-berlin.de/~roehrigw/spanisch/sg-centen.htm.

Sánchez-Pagés, Santiago (2016): “Moneda, sí, ¿pero social?”. *Contexto y Acción*, n-ro 93. http://ctxt.es/es/20161130/Firmas/9776/moneda-social-Barcelona-Ada-Colau-comercio-local-laies.htm

Schor, Esther (2016): *Bridge of Words: Esperanto and the dream of a universal language.* New York: Metropolitan Books.

Sikosek, Ziko Marcus (2003): *Esperanto sen mitoj*. Flandra Esperanto-Ligo.

Stolleis, Michael (2011): “La ínsula Barataria (unas anotaciones sobre utopías, literatura y “policía”)”. *E-Legal History Review*, n-ro 12.

Torrens, Lluís (2016): “En defensa de la moneda social barcelonesa”. *Contexto y Acción*, n-ro 91. http://ctxt.es/es/20161116/Firmas/9600/Moneda-social-Ayuntamiento-Barcelona-B-Mincome.htm

Weber, Paul (1913): *Die Polen in Oberschlesien: eine statistische Untersuchung*. Berlin: Verlagsbuchhandlung von Julius Springer. https://archive.org/details/diepoleninobersc00webeuoft

Zamenhof, L. L. (2005) [1903]: *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto*. Dua eldono. Paris: Hachette & cie.

— (1929): *Originala Verkaro*. Kompilis Johannes Dietterle. Leizpig: Ferdinand Hirt & Sohn.

— (2006): *Mi estas homo*. Kompilis kaj komentis Aleksander Korĵenkov. Kaliningrado: Sezonoj.

**Javier Alcalde**
Nask. 1978. Doktoro pri sociaj kaj politikaj sciencoj, nuntempe instruas internaciajn rilatojn en pluraj universitatoj en Barcelono. Okupiĝas pri refuĝintoj, malarmado, sociaj movadoj, pacismo, lingva justeco kaj Esperanta historio. Kune kun José María Salguero li kunordigis la eldonon de *Antaŭ Jarcento. La Granda Milito kaj Esper*anto (SAT, 2018).